

**Protokolo de la kunsidoj de la ILEI-Komitato  
en Kaunas (Litovio)  
30/07-04/08/2005**

Listo de mallongigoj:

AC: Aida ČIŽIKAITĖ

AOR: Atilio ORELLANA ROJAS

CA: Carola ANTSKOG

GK: Geza KURUCZ

IK: Ilona KOUTNY

JA: Juna Amiko

LM: Luigia MADELLA

MB: Marija BELOŠEVIĆ

MG: Maritza GUTIÉRREZ

RP: Radojica PETROVIĆ

SMG: Stefan MacGILL

**Unua kunsido**, lundon la 1-a de aŭgusto 2005. La kunsido komenciĝas je la 14:00.

## **1. Enkonduko**

### **1.1 Bonvenigo**

La Vic-Prezidanto, Stefan MacGILL (SMG), bonvenigas la ĉeestantojn.

### **1.2 Kontrolo de la kvorumo**

La Sekretario, Atilio ORELLANA ROJAS (AOR), kontrolas la kvorumon. Ĉeestas komitatanoj kaj anstataŭantoj, kiuj sumas 18 voĉojn. La Komitato rajtigas SMG kaj AOR havi la voĉojn de Radojica PETROVIĆ (RP) kaj Sjoerd BOSGA (SB) respektive.

AOR laŭtlegas salutmesaĝojn de komitatano A. STAES el Belgio kaj de la Sekciestro el Albanio, B. SELIMI, kiuj ne povas ĉeesti la Kunsidojn kaj Konferencon.

### **1.3 Definitivigo de la tagordo**

La tagordo estas akceptita.

### **1.4 Aprobo de la protokolo da la antaŭa kunsido**

Sekvas voĉdonado por la aprobo de la antaŭa protokolo.

Por: 19, kontraŭ: 0, sindeteno: 1. La propono estas akceptita.

### **1.5 Starigo de komisionoj kaj laborgrupoj**

Estas propono starigi dumkonferencan laborgrupon pri Eŭropaj Projektoj. En ĝi membroj Carola ANTSKOG (CA), Luigia MADELLA (LM), Ermanno TARRACCHINI kaj Mihai TRIFOI.

La propono esta unuanime akceptita.

### **1.6 Disdono de nova materialo**

AOR disdonas la raporton de la Kaskontrola Komisiono.

## **2. Elektoj**

### **2.1 Honoraj Membroj**

La Sekretario ne ricevis proponojn.

## **2.2. Estraranoj**

AOR raportas pri la propono prezentita de la Elekta Komisiono por nova membro de la Estraro, nome, S-ino Aida ČIŽIKAITĚ (AC). AOR laŭtlegas la biografion de AC.

Sekvas voĉdonado. Por: 20, kontraŭ: 0, sindeteno:0. La propono estas akceptita.

De tiu momento AC ekmembras en la Komitato.

## **3. Raportoj**

### **3.1 Jarraporto**

Luigia MADELLA (LM) pri 1.2.2 esprimas la deziron pri baldaŭa eldono de nova ekzamena gvidilo.

Sekvas voĉdonado por aprobo de la Jarraporto. Por: 20, kontraŭ: 0, sindeteno: 1. La raporto estas aprobita.

### **3.2 Raporto pri la periodo januaro-junio 2005**

Marija BELOŠEVIĆ (MB) demandas, kion la estraranoj faris en la diversaj kampoj prizorgataj. La komitatanoj ricevis rete raporton pri ĉi tiu punkto rekte de RP. AOR resumas la laboron plenumitan de ĉiu estrarano.

La Komitato petas pli da informoj pri la laboro de la Estrarano pri Universitata Agado.

La kunsido finiĝas je la 15:00.

**Dua kunsido**, ĵaŭdon la 4-a de aŭgusto 2004. La kunsido komenciĝas je la 09:00

SMG bonvenigas la ĉeestantojn. AOR konstatas, ke ĉeestas kvorumo.

SMG proponas, ke la punkto 8 de la tagordo estu anstataŭata per 'Instruista Trejnado' kaj ke la nuna punkto 8 iĝu 11.

Sekvas voĉdonado por la propono. Por: 16, kontraŭ: 0, sindetenoj: 1. La propono estas aprobita.

## **4. Landa kaj regiona agadoj**

### **4.1 Raporto de Sekciestroj kaj Reprezentantoj**

La komitanoj ricevis raportojn pri la agado de la Sekcioj kune kun la preparadokumentoj por la konferencaj kunsidoj de la Komitato.

MB demandas pri la Sekciestroj kaj Reprezentantoj ne agantaj kaj pri la membronombro en tiuj landoj. AOR listigas la landoj, kies Sekciestroj kaj Reprezentantoj ne reagis en la lastaj 2 jaroj al la diversaj ILEI-sendaĵoj. AOR raportas pri la situacio en Brazilo kaj la ekesto de nova Sekciestro ekde julio 2005 kaj ankaŭ pri la situacio en Germanio kaj la ebleco revivigi la Sekcion en oktobro 2005.

CA demandas pri membroj en Litovio. AOR informas, ke estas 3. AC klarigas, ke € 8,00 estas konsiderinda sumo en Litovio por membriĝi al ILEI.

Maritza GUTIÉRREZ demandas pri la agado de la Azia Komisiono. AOR montras tekston, kiun Rob MOERBEEK aperigis en La Mondo 2005:3 pri la ekzisto de la Komisiono.

La Komitato petas la Sekretarion baldaŭ kontakti la dormantajn Sekciojn cele al ilia restariĝo.

### **4.2 Aliĝopetoj de novaj Sekcioj**

AOR raportas pri peto veninta el Hispanio por kreado de Sekcio. Sekvas diskuto pri la peto kaj poste voĉdonado por la propono akcepti la starigon de ILEI-Reprezentanto en Hispanio.

Por: 18, kontraŭ: 0, sindetenoj: 0. La propono estas aprobita.

## **5. Komisionoj**

### **5.1 Ekzamena**

MB demandas pri la nuna konsisto de IRE kaj ĉu ŝi ankoraŭ membras en ĝi aŭ ne. AOR respondas, ke ŝi ja membras, sed ne povas parkere diri la nomon de ĉiu membro. AOR konstatas, ke la hejmpaĝo de ILEI aperas la IEK-listo, sed ne IRE-listo.

La Komitato rekomendas al la Estraro la aperigon de kompleta listo de IRE-anoj en la ILEI-hejmpaĝo.

Ilona KOUTNY (IK) demandas, ĉu ŝi membras en la listo kaj deziras havi pliajn informojn pri la porinstruista ekzameno. SMG respondas, ke regularo por la ekzamenoj ekzistas, sed ne estas ekzamenoj. AOR konfirmas, ke ne estas komisiono, kiu prizorgu tian nivelon de ekzamenoj.

La Komitato rekomendas al la Estraro elekti membrojn por funkciigi la porinstruistan ekzamenon.

### **5.2 Lerneja**

Sylvia HÄMÄLÄINEN (SH) rememorigas, ke en la jaro 2004 tiu Komisiono estis nuligita de la Komitato. AOR konfirmas la nuligon, sed montras la taŭgecon krei komisionon, kiu prizorgu la agadon de Interkulturo, Euroscola kaj aliaj lernejoj projektoj. SMG sugestas, ke la dumkonferenca laborgrupo pri Eŭropaj Projektoj iĝu tia komisiono.

Sekvas voĉdonado por la propono starigi Lernejan Komisionon. Por: 19, kontraŭ: 0, sindetenoj: 1. La propono estas aprobita.

La Komitato petas la Estraron utiligi paĝojn de IPR por informi pri la diversaj projektoj de ILEI kaj doni spacon en la ILEI-hejmpaĝo por prikomisionaj informoj.

### **5.3 Terminara**

Ne estas raporto.

IK informas, ke ŝi aperigis vortaron kaj turnis sin al Mauro La TORRE por peti subtenon de ILEI, sed ne ricevis reagon. MB esprimas, ke tiaspeca demando de IK pravigas ŝian pri la agado de la estraranoj.

### **5.4 Statuta**

Ne estas raporto.

## **6. Financoj**

### **6.1 Financa raporto 2004**

SMG priparolas la rezultojn 2004. LM demandas, kiam oni prezentos ĉiujn mankantajn dokumentojn. Ŝi ankaŭ deziras scii pri la elspezoj faritaj pri projektoj. SMG klarigas, ke ILEI ricevis monon de ESF kaj de UEA. LM petas buĝeton pri ĉio rilate al JA kaj IPR.

La Komitato petas la Kasiston respondi la starigitajn demandojn.

### **6.2 Raporto de la Kontrola Komisiono**

AOR laŭtlegas la tekston de la Kaskontrola Komisiono.

Sekvas voĉdonado por la propono de la Kaskontrola Komisiono provizore fiksi la bilancon 2004 por fina revizio post la kongresa periodo 2005 kaj malŝargi la Estraron por la jaro 2004. Por: 20, kontraŭ: 0, sindetenoj: 1. La propono estas aprobita.

### **6.3 Buĝetoj 2006**

SMG prezentas provizoran buĝeton por la jaro 2006. MB proponas enmeti sumon por subvencioj kaj projektoj kaj ŝi petas, ke oni havu superrigardon pri la enspezoj kaj elspezoj de tio en kio ILEI partneras.

Sekvas voĉdonado por la proponata provizora buĝeto kun la indiko, ke ĝi estu gviddokumento por la kasisto kaj la estraro poste rajtu fari la necesajn ŝanĝojn kaj poste informi la Komitaton. Por: 20, kontraŭ: 0, sindetenoj: 0. La propono estas aprobita.

#### **6.4 ILEI-Fondaĵoj kaj kaso**

MB petas, ke la listo de Fondaĵoj kaj Kasoj aperu en IPR kaj ne nur en la aliĝilo al la Konferencoj estu mencio pri la ebleco donaci al ili. Plie, MB sugestas eldoni faldfolion por informi la membrojn pri la diversaj Kasoj.

AOR informas pri la membrigitoj pere de la Koleghelpa Kaso: en la jaro 2005, 5 personoj. Pli longa listo atendas pritrakton de la Estraro.

### **7. Eldonado**

#### **7.1 IPR**

##### **7.1.1 Enhavo**

SMG raportas, ke IPR aperis regule. La Komitato dankas kaj gratulas la redaktoron pro la daŭre bona laboro farita por pretigi versiojn por papera kaj reta eldonoj de ĝi.

##### **7.1.2 Scienca Komitato**

SMG prezentas la planon pri kreado de Scienca Komitato por IPR. AC mencias la nomojn de kelkaj el la akceptintoj membri en ĝi kaj indikas, ke plena listo estas jam sendita al la Estraro. AOR proponas, ke la Komitato aprobu la starigon de Scienca Komitato por IPR kaj komisiu la Estraron plu difinu ĉion ceteran pri ĝi (taskoj, daŭro de la deĵorperiodo, ktp) kaj komunik tion al la Komitato

Sekvas voĉdonado por la propono. Por: 20, kontraŭ: 0, sindetenoj: 0. La propono estas aprobita.

#### **7.2 JA**

SMG prezentas la novan aspekton de JA kaj laŭdas Geza KURUCZ (GK) pro la akurateco en la pretigado de materialo por ĝi. Li klarigas, ke nunteme estas 720 abonantoj, mankas peranto en Nederlando kaj en Brazilo estas atendata altigo de la abonantaro. Ron GLOSSOP rimarkigas, ke inter la revoj aboneblaj pere de ELNA ne estas JA. MB bedaŭras la mankon de plia partopreno en la konkursoj. AC plendas, ke la revuo alvenas tro malfrue, kiam la dato por la sendado de materialo por konkursoj estas jam pasinta. SMG petos al GK pli longan datlimon por la konkursaĵoj.

#### **7.3 Aliaj eldonaĵoj**

SMG diras, ke la plej ĉefa estas la Manlibro, kiu estas aĉetebla ĉe ILEI. Ĉar la eldonkvanto estis malgranda, estas atendata baldaŭa represo. SMG plie diras, ke estas planoj por reldono de Tendaraĵoj 1: jam 30 paĝoj estas pretaj, sed la desegnisto ne estas facile rekontaktebla. MB demandas pri reldono de la Ekzamena Gvidilo, instruhelpiloj kaj lerniloj sur kompaktoj diskaj. SMG respondas, ke ILEI ne havas laborforton por entrepreni tian laboron. AOR sciigas, ke la Internacia Ekzamena Komisiono revizias la enhavon de la Gvidilo antaŭ reldono. MB demandas, ĉu ILEI havas ian rilaton al la instancoj eldonintaj la instrufilmojn 'Mazi en Gondolando' kaj 'Esperanto, pasporto al la tuta mondo'. SMG diras, ke li ne plu povas redakti por la dua filmo pro tempomanko kaj ke por 'Mazi' li havas multan materialon, kiu atendas iaspecan eldonadon. MB sugestas, ke ILEI aperu en priedukaj eldonaĵoj. SMG asertas, ke por povi priatenti ĉion rilate al eldonaĵoj estas bezonata Komisiito.

## **8. Instruista Trejnado**

SMG informas, ke en oktobro kaj kunlabore kun la E-Centro en Herzberg, ILEI okazigos Seminarion. Li informas pri loĝeblecoj, programo, instruistoj.

IK proponas, ke ILEI kaj la Universitato en Poznan kunlaboru. Tie la trejnado de instruistoj estas solvita je universitata nivelo. Ŝi proponas, ke la kunlaboro okazu en la lasta jaro de la studoj, kiam oni laboras pri metodiko. IK diras, ke ŝi sendis proponon pri tio al la Estraro, sed ĝi estis neglektita. SMG petas resendi la tekston al la Estraro kun precizigoj, kio estas atendata de ILEI.

La Komitato petas la Estraranon pri Universitata Agado trakti la proponon de la Universitato en Poznan.

## **9. Konferencoj**

### **9.1 Konferenco 2006**

AOR raportas pri la kontaktoj faritaj en Rimini kaj la ekzistantaj eblecoj en tiu urbo kaj en San Marino. LM esploras septembre la eblecoj en Rimini. AOR proponas, ke la daŭro de la konferencoj estu 4 tagoj kun alveno en mardo posttagmeze kaj ke oni ne proponu ekskursojn. LM sugestas, ke okazu ia trejnado kadre de la sekvajara Konferenco kaj laŭdas la okazigon de Simpozio kadre de la ĉijara Konferenco. Rilate al la ebla konferenco en Italio, LM asertas, ke ŝi povos kalkuli surloke je la helpo de pastro MAGNANI kaj de membroj de la Sekcio.

### **9.2 Konferenco 2007**

AOR raportas pri la kontaktoj faritaj en Japanio kaj la eblecoj konferenci en Kameoka en la jaro 2007 ĉe la ĉefsidejo de Oomoto. Estas montrataj fotoj kaj fladfolioj pri la loko kaj la komitatanoj estas informataj pri la nunaj prezoj por tranoktado kaj eblecoj por alveno al Kameoka de Jokohamo.

Plie, AOR raportas pri la kontaktoj faritaj cele al la ebla okazigo de Konferenco ie en Afriko.

## **10. Eksteraj rilatoj**

### **10.1 Rilatoj kun la E-Movado**

MB demandas, ĉu la pasintjara kunsido kun la plenumkomitato de SAT donis ian rezulton.

AOR respondas, ke la sola sekvo estis interŝanĝo de revuoj.

Pliaj informoj estas menciitaj en la raporto sendita de RP al la komitatanoj.

### **10.2 Rilatoj kun ne E-organizoj**

Ne estis traktita.

#### **10.2.1 UNESKO**

AOR sciigas, ke ekde post la konferenco povos reprezenti ILEI François Lo JACOMO el Parizo.

Pliaj informoj estas menciitaj en la raporto sendita de RP al la komitatanoj.

#### **10.2.2 FIPLV**

Ne estis traktita.

#### **10.2.3 Aliaj organizoj**

Ne estis traktita.

## **11. Strategio, prioritatoj kaj agadplano de ILEI por la sekva periodo**

Ne estis traktita.

### **8.1 Strategio kaj prioritatoj**

Ne estis traktita.

### **8.2 Enhavo**

Ne estis traktita.

### **8.3 Rimedoj kaj plenumontoj**

Ne estis traktita.

## **12. Ceteraĵoj**

AOR laŭtlegas la raporton de la Komisiono pri Eŭropaj Projektoj.

## **12. Akcepto de Rezolucio**

Ne estis rezolucio.

SMG dankas la partoprenantojn kaj je la 12:15 fermas la kunsidon.

Protokolis AOR